

REVUO

Monata Aldono al Esperanto Triumfonta.

NUMERO 2

1922

DECEMBRO

*Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de l' nokto forkuras el mond'.*

ESTAS dece, ke de tempo al tempo ni reprezentu al nia memoro la plej meritintajn pionirojn de nia ideo, ĉu mortintajn ĉu vivantajn. Per tio ni samtempe plenumas honoran devon kontraŭ ili, kaj ankaŭ, mem gajnas novan kuraĝon kaj novan forton je ilia kuraĝo kaj forto.

Unu el niaj plej grandaj pioniroj, bedaŭrinde jam ne vivanta, estas tiu, kiu skribis la belajn vortojn metitajn super ĉi tiu artikolo: Antoni Grabowski! Tiu homo, kiu unue parolis kun la Majstro per Esperanto. Tiu homo, kies tradukaĵo „La neĝa blovado“ aperis kiel unua Esperantista verko. Tiu homo, kiu fondis unu el la plej fruaj Esp. grupoj. Tiu homo, kiu tradukis la unuan Esperante kantitan operon. Tiu homo, kiu kreis la jubilean verkon „El Parnaso de Popoloj“ enhavantan krom poemoj el 30 nacioj ankaŭ kelkajn originalajn poemojn, inter ili la faman, entuziasmigan kaj ofte kantatan himnon „Tagiĝo“.

Kun li ni vidas la radiantan tagiĝon. En la profundan maron fugis malhelaj la ombroj de l' nokto, ĉe l' rando de l' ho-

rizonto ekaperis brilanta la suno, profetante belan matenon kaj lumplenan tagon. Stariĝos montegoj, kolektiĝos nubegoj. Sed foje ekaperintan sunon jam ne haltigos montegoj nek nubegoj en ĝia kurado.

Alten, alten ĝi leviĝos al la zenito, al venko kaj triumfo.

Feliĉaj niaj unuaj pioniroj, kiuj povis vidi kaj travivi la matenruĝon de nova tagiĝo, kiuj povis ĝui la unuajn radiojn de l' aperonta astro de l' tago. Pli feliĉaj ni, kiuj vidas kaj travivas la belan matenon de nova, pli luma tempo post nokto de malhelago, timego kaj sango. Plej feliĉaj niaj posteuloj, kiuj jam vivos en la hela, glora tago de l' kompreno kaj toleremo, rikoltante la fruktojn, kiujn semis la pioniroj de la plej granda kulturideo de l' nuntempo.

Ni scias, por kio ni klopodas kaj laboras,

por kio ni oferas forton, tempon kaj monon. La mondo skuu la kapon, nomu nin mal-saĝuloj, utopiuloj. Fine ĝi tamen ekkonos sian eraron kaj benos nin. Intertempe ni ne haltu en nia laboro. La fiero pri la jam atingitaj sukcesoj kaj la memoro pri niaj plej grandaj pioniroj donu al ni kuraĝon kaj forton elteni ĝis „tagmezo“, ĝis la fina venko.

Tagiĝis; la suno de Esperanto jam ne estas haltigebla en sia kurado!



Antoni Grabowski (1857—1921).

La Tagiĝo

*Agordu la brustojn, ho nia fratar',
Por nova, pli vigla jam kanto!
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
Anoncu al ĉiu dormanto:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'!*

*Post longa migrado sur dorna la voj'
Minacis nin ondoj de l' maro;
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'
Al verda haven' de l' homaro.
Post longa batalo, maldolĉa turment',
La stela standardo jam flirtas en vent'.*

*Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
Ni estas jam bone harditaj;
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',
Nek ies perfidoj subitaj.
Nenio en mondo elŝiros ĝin for',
Ĝi havas radikojn profunde en kor'.*

*Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',
Benante la Majstron por verko,
Kaj lian anaron, de plej frua hor'
Fidelan al li, ĝis la ĉerko.
La mond' aliiĝos, la temp' pasos for,
Sed vivos eterne pri ili memor'.*

*La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela.
Kaj same fidelaj al hejma altar',
Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.*

*En ĉiu mondparto, en ĉiu ter-zon',
En koroj de centoj da miloj,
Jam vibras por nia saluto reson',
Do kantas de l' tero ni filoj:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'!*

La neĝa blovado.

Rakonto de A. Puŝkin, tradukita de Antoni Grabowski.

EN la fino de l' jaro 1811-a, en epoko al ni memorinda, vivis en sia vilaĝo Nenaradovo la bona Gavriilo Gavriloviĉ' R. Li gloriĝis en la tuta ĉirkaŭaĵo pro gastamo kaj koreco; la najbaroj ĉiuminute veturadis al li por manĝi, trinki, ludi kun lia edzino Praskovja' Petrovna po kvin kopekoj je l' bostono; kaj kelkaj el ili — por rigardi ilian filineton Marion Gavrilovna'n, gracion, palan kaj deksepjaran junulinon. Ŝi estis rigardata kiel riĉa fraŭlino, kaj multaj antaŭdecidis ŝin por si aŭ por siaj filoj.

Mario Gavrilovna estis edukita sur francaj romanoj kaj tial kompreneble jam amanta. La objekto, elektita de ŝi, estis malriĉa oficiro, kiu sin trovis forpermeso en sia vilaĝeto. Estas kompreneble per si mem, ke la juna homo brulis egale per ama fajro, kaj ke la gepatroj de lia amata, sciiginte ilian duflankan amon, malpermesis

la filinon eĉ pensi pri li, kaj lin ricevadis pli malbone ol eksigitan ĵuran alsidanton.

Niaj amantoj estis en korespondado, kaj ĉiun tagon ili sin vidis je kvar okuloj en pina arbareto aŭ ĉe l' malnova preĝeĵeto. Tie ili ĵuradis unu al la alia eternan amon, plendadis je la sorto kaj faradis multoblajn projektojn. Korespondante kaj interparolante tiasence, ili (kio estas tre natura) alvenis al la jena decido: se ni unu sen la alia ne povas vivi, kaj la volo de la senkompataj gepatroj baras nian feliĉon, ĉu ni ne povas veni al la celo ankaŭ sen ĝi?

Oni komprenas, ke tiu-ĉi feliĉa penso venis unue en la kapon de la juna homo, kaj ke ĝi multe plaĉis al la romana fantazio de Mario Gavrilovna.

Venis la vintro kaj ĉesigis iliajn revidojn, sed la korespondado fariĝis tiom pli viva. Vladimiro Nikolajeviĉ' en ĉiu letero ŝin petegis ke ŝi transdonu sin al li, edziĝu je li sekrete, kaŝu sin kelkan tempon kun

li, kaj poste ili ĵetus sin al la piedoj de la gepatroj, kiuj nature estus fine tuŝitaj per la heroa konstanteco kaj la malfeliĉo de la amantoj kaj dirus al ili certe: „Infanoj, venu al niaj koroj!“

Mario Gavrilovna longe ŝanceliĝadis; multaj projektoj de l' forkuro estis forĵetitaj. Fine ŝi konsentis: en certigita tago ŝi devis ne vespermanĝi, sed foriĝi en sian ĉambron el la ŝajnkaŭzo de l' doloro je l' kapo.

Sia servanta knabino estis en komploto; ili du devis eliri en la ĝardenon trans la posta balkona ŝtuparo, trovi pretigitan glitveturilon, sidigi sin en ĝi kaj veturi ĉirkaŭ kvin verstojn de Nenaradovo, en la vilaĝon Jadrino, rekte antaŭ la preĝejon, kie Vladimiro jam devis ilin atendi.

Antaŭ la decidanta tago Mario Gavrilovna ne dormis tutan la nokton; ŝi ordadis kaj kunligadis sian tolaĵon kaj vestaĵon, skribis longan leteron al unu sentema fraŭlino, ŝia amikino, alian al siaj gepatroj. Ŝi diris adiaŭ al ili en la plej kortuŝantaj vortoj, senkulpigis sian eraron per ia nevenkebla forto de la ama sento kaj finis per tio, ke la plej feliĉa minuto de l' vivo estos por ŝi tiu, kiam estos permesita al ŝi ĵeti sin al la piedoj de la plej karaj gepatroj.

Sigelinte la du leterojn per Tula sigelilo, sur kiu estis elformitaj du brulantaj koroj kun konvena surskribo, ŝi ĵetis sin sur la liton mallonge antaŭ la lumiĝado de l' tago, kaj ekdormetis; sed ankaŭ tie ĉi teruraj songaj fantazioj ĉi minute ŝin vekadis.

Jen ekŝajnis al ŝi, ke en tiu sama minuto, kiam ŝi sidiĝis en la glitveturilon, por veturi al la edziĝo, la patro ŝin ekhaltigis, kun turmenta rapideco ŝin trenis sur la neĝo kaj ĵetis en malluman senfundan subteraĵon... kaj ŝi flugis malsupren kun neklarigebla mortiĝado de l' koro... jen ŝi vidis Vladimiron, kuŝantan sur la herbo, palan kaj sangantan. Mortante, li petegis ŝin per voĉo iranta tra l' koro, ke ŝi rapidu por lin edzigi... Aliaj malbelaj, sensencaj songaj vidaĵoj sin portis antaŭ ŝi unu post la alia. Fine ŝi levis sin el la lito, pli pala ol kutime, kaj

kun ne-preteksta doloro je l' kapo. La patro kaj la patrino ekvidis ŝian maltrankvilecon; ilia karesa zorgado kaj la senĉesaj demandoj: „Kio estas al vi, Manjo? Ĉu vi ne estas malsana, Manjo?“ disŝiradis al ŝi la koron. Ŝi penis ilin trankviligi, montri sin ĝoja, kaj ne povis.

Venis la vespero. La penso, ke jam la lastan fojon ŝi pasigas tagon en la mezo de sia familio, premis ŝian koron. Ŝi estis apenaŭ viva; sekrete ŝi diris adiaŭ al ĉiuj personoj, al ĉiuj objektoj, kiuj ŝin ĉirkaŭadis. La vespermanĝo estis enportita; ŝia koro forte ekfrapis.

Per tremanta voĉo ŝi diris, ke ŝi ne havas apetiton por vespermanĝi kaj komencis adiaŭi je la patro kaj la patrino. Ili ŝin kisis kaj, kiel kutime, benis: ŝi apenaŭ ne ekploris.

Veninte en sian ĉambron, ŝi ĵetis sin sur la seĝon kaj verŝis varmegajn larmojn. Sia knabino konsilis al ŝi, ke ŝi trankviliĝu kaj kuraĝiĝu. Ĉio estis preta. Post duonhoro Manjo devis por ĉiam forlasi la domon gepatran, sian ĉambron, la trankvilan vivon fraŭlinan. Ekstere estis neĝa blovado; la vento fajfis, la lignaj fenestraj kovriloj tremadis kaj frapadis; ĉio ŝajnis al ŝi kiel timigadoj kaj malfeliĉaj antaŭsignoj.

Baldaŭ en la domo ĉio trankviliĝis kaj ekdormis. Manjo ĉirkaŭkovris sin per ŝalo, metis sur sin varman superveston, prenis en la manon sian kesteton kaj eliris sur la postan verandon. La servantino portis post ŝi du kuneligaĵojn. Ili eliris en la ĝardenon. La neĝa blovado ne trankviliĝis, la vento blovis kontraŭen, kiel penante haltigi la junan krimulinon.

Fine ili alvenis al la fino de l' ĝardeno. Sur la vojo la glitveturilo ilin atendis. La ĉevaloj, trafrostitaj, ne volis stari trankvile sur la loko, la veturigisto de Vladimiro promenadis antaŭ la glitveturila turnilo moderigante ilian fajrecon. Li helpis la sinjorinon kaj ŝian servantinon sidiĝi kaj kuŝigi la kuneligaĵojn kaj la kesteton, prenis la kondukilojn en la manojn kaj la ĉevaloj fluge ekkuris.

Transdonante la fraŭlinon al la zorgado de l' sorto kaj al la arto de Tereŝka, la

veturigisto, ni turniĝos al nia juna amanto.

La tutan tagon Vladimiro estis en veturado. Matene li estis ĉe l' Ĵadrina pastro; kun malfacilo ili venis al konsento. Poste li veturis serĉi atestantojn por la edziĝo inter la najbaraj vilaĝestroj. La unua, al kiu li venis, la eksa kvardekjara standardestro Dravin', konsentis kun plezuro. Tiu ĉi afero, li diris, rememorigis al li la pasintajn tempojn kaj la husarajn ŝercetojn. Li invitis Vladimiron resti ĉe li por tagmanĝi kaj certigis lin, ke trovi la du aliajn atestantojn ne estos malfacile. Efektive tuj post la tagmanĝo venis la geometriisto Ŝmidt' kun lipharoj kaj pikradetoj ĉe la botoj, kaj la filo de kapitano de l' ĵandarmeo, knabeto deksejara, kiu antaŭ kelka tempo aliĝis al la ulanoj. Ili ne sole alprenis la proponon de Vladimiro, sed ankaŭ ĵuris la pretecon oferi por li la vivon. Vladimiro ĉirkaŭprenis ilin kun neesprimebla ĝojo kaj forveturis la domon por sin prepari.

Jam longe mallumiĝadis. Li elsendis sian fidelan Tereŝka'n en Nenaradovon kun sia trio da ĉevaloj kaj kun detala, vasta ordono; por si li ordonis prepari malgrandan glitveturilon unuĉevalan, kaj tute sola, sen veturigisto, li forveturis Ĵadrinon, kien post du horoj devis ankaŭ alveni Mario Gavrilovna. La vojon li konis, kaj la tuta veturo devis daŭri nur dudek minutojn.

Sed apenaŭ Vladimiro estis elveturinta en la kampon, eklevis sin vento kaj fariĝis tia neĝa blovado, ke li nenion vidis. En unu minuto la vojo estis kovrita de neĝo, la ĉirkaŭaĵo perdiĝis en la nebulo malklara kaj flaveta, tra kiu flugadis blankaj flokoj de l' neĝo; la ĉielo kuniĝis kun la tero; Vladimiro ekvidis sin sur la kampo kaj vane li volis denove eltrovi la vojon; la ĉevalo paŝis rekte antaŭen kaj ĉiuminute jen ĝi veturadis sur neĝan amason, jen faladis en kavon; la glitveturilo ĉiuminute sin renversadis.

Vladimiro nur penis ne perdi la veran direkton. Sed ŝajnis al li, ke jam pasis pli ol duonhoron kaj li ankoraŭ ne alveturis al la Ĵadrina arbetaro. Pasis ankoraŭ ĉirkaŭ

dek minutoj, la arbetaro ĉiam ankoraŭ ne estis videbla. Vladimiro estis veturanta tra kampo tranĉita per profundaj kavoj. La neĝa blovado ne frankviliĝadis, la ĉielo ne ellumiĝadis. La ĉevalo komencis laciĝi kaj de li la ŝvito faladis kiel hajleroj, malgraŭ ke li ĉiuminute estas ĝis la duono en la neĝo.

Fine li ekvidis, ke li veturis en malvera direkto. Vladimiro haltis: li komencis pripensadi, rememorigadi, prezentadi al si kaj certigi, ke li devis preni la vojon dekstren. Li ekveturis dekstren. Lia ĉevalo apenaŭ paŝadis. Jam pli ol unu horon li estis en vojo. Ĵadrino devis esti proksima. Sed li veturis, veturis, kaj la kampo ne havis finon. Ĉie neĝaj amasoj kaj kavoj; ĉiuminute la glitveturilo sin renversadis, ĉiuminute li ĝin levadis. La tempo pasadis, Vladimiro komencis forte malfrankviliĝi.

Fine en la flanko sin montris io nigra. Vladimiro tien sin turnis. Proksimiĝante li ekvidis arbetaron. Glor' al Dio, li ekpensis, nun ĝi estas proksima. Li veturis al la arbaro, esperante baldaŭ trovi la konatan vojon aŭ ĉirkaŭveturi la arbetaron: Ĵadrino estis tuj post ĝi. Baldaŭ li trovis la vojon kaj enveturis en la malmumon de l' arboj, nudigitaj de la vintro. La vento ne povis tie koleregi; la vojo estis glata; la ĉevalo reprenis la kuraĝon kaj Vladimiro frankviliĝis.

Sed li veturis kaj Ĵadrino ne estis videbla; la arbetaro ne havis finon. Vladimiro kun teruro ekvidis, ke li estis enveturinta en nekonatan arbaron. Malespero lin prenis. Li ekbatis la ĉevalon; la bedaŭrinda besto ekiris kure, sed baldaŭ ĝi komencis haltadi, kaj post kvaronhoron ĝi komencis iri paŝe, malgraŭ ĉiuj penoj de la malfeliĉa Vladimiro.

Baldaŭ la arboj komencis maldensiĝi kaj Vladimiro elveturis el la arbaro: Ĵadrino ne estis videbla. Estis ĉirkaŭ la meznokto. La larmoj elfluis el liaj okuloj; nun li veturis rekte antaŭen. La vetero frankviliĝis; la nuboj disiradis; antaŭ li kuŝis ebenaĵo, kovrita de blanka ondforma tapiŝo. La nokto estis suŝe luma. Li ekvidis nemalproksime vilaĝeton, kunmetitan el kvar aŭ kvin kortoj. Vladimiro veturis tien. Ĉe l' unua dometo li elsaltis el la glitvetur-

ilo, alkuris al la fenestro kaj komencis frapadi. Post kelkaj minutoj la ligna fenestra kovrilo sin levis kaj ia maljunulo elmetis sian grizan barbon. (finota.)

* * *

Tiu ĉi rakonto estas ĉerpita el la „Kondukanto kaj Antologio Internacia“ de Grabowski kaj estas unu el la plej fruaj literaturaĵoj Esperantaj. Jen, kion skribas Grabowski en la antaŭparolo en la „Antologio Internacia“:

„... La Kondukanto kaj la tri unuaj rakontoj de la Antologio (inter ili „La neĝa blovado“) estas verkitaj, kiel tion ĉi montras iom la stilo, en la periodo de la lingvo Esperanta, kiam ekzistis nur la unua lernolibro kun folia vortareto enhavanta ĉirkaŭ 900 radikojn. Dank' al tiu ĉi propreco la kolekto estas tre facile legebla kaj povas eĉ nun servi bone al la komencantaj Esperantistoj, kiuj ne posedas ankoraŭ plene la lingvon...“

Sopiro al Patrujo.

Tradukis Antoni Grabowski.

(El „Pan Tadeusz“ de Adam Mickiewicz.)

*Litvo, patrujo mia! Simile al sano
Vian grandan valoron konas nur landano,
Vin perdinte. Belecon vian mi admiras,
Vidas ĝin kaj priskribas, ĉar je vi sopiras.
Dipatrino! Vi gardas Ĉenstoĥovon helan,
En Ostra-Brama lumas! Vi, kiu kastelan
Novogródek defendas kaj pian urbanon. —
Kiel Vi al infano redonis la sanon,
(Kiam mi, de l' patrino al Vi oferite.
La malvivan palpebron eklevis subite
Kaj povis tuj al via sanktejo ekiri,
Por redonita vivo Dion dankodiri) —
Tiel Vi nin mirakle portos hejman limon!...
Dume transportu mian sopiran animon
Al montetoj arbaraj, herbejoj verdantaj,
Largĝe apud lazura Njemen tirigantaj;
Al la kampo, per greno diversa pentritaj,
De sekalo arĝentaj, de tritik' oritaj,
Kiujn la neĝe-blankà poligon' ornâmàs,
Kie per virga ruĝo timiano flamas,
Kaj ĉion zonàs, kvazaŭ per verda rubando,
La kampà, kun maldensaj pirarboj, limrando.*

.....

Moderna alĥemio.

Depost la tagoj de Dalton, la elpensinto de la atomteorio, ĉiuj progresoj de la ĥemio bazas sur la fundamenta percepto, ke la atomo estas nedispartigebla kaj nedetruibla. Ĥemiaj eksperimentoj de preskaŭ unu jarcento klare pruvis, ke ne estas eble disfendi atomon ĉu per aplikado de pure ĥemiaj aŭ de fizikaj metodoj. Nur lastatempe ĉi tiu hipotezo certgrade ekŝanceliĝis, kiam la gravegaj esploroj pri radiumaktiveco kondukis al aliaj imagoj koncerne la internan konstruon de l' atomo. Nuntempe oni konvinkiĝis en preskaŭ ĉiuj fakaj rondoj, ke la atomoj de l' elementoj grandatrajte havas la saman strukturon: En la centro de ĉiu atomo senescepte troviĝas kerno pozitivelektre ŝargita, ĉirkaŭita de certa nombro da elektronoj, ekvilibrigataj per la altiranta forto de l' kerno. La ŝargiteco de l' kerno kaj la nombro de l' elektronoj varias ĉe la diversaj elementoj. Se oni sukcesus iel ŝanĝi ĉi tiun ordon de la elektronoj, oni kapablus transformi la atomon de iu elemento en tiun de alia. La forto, per kiu la kerno altiras al si la elektronojn, estas ja eksterordinare granda, kaj por superi

ĝin, estas necese uzi grandegajn kvantojn da energio. La „alfa“-partetoj aŭ -radioj estas fonto de tia plej koncentrigita energio. Trafonte la elementojn per ĉi tiuj partetoj, kredeble oni sukcesos estigi ŝanĝon aŭ disfalon de la atoma komplekso. Ĉi tio estas la ideo de Rutherford, kaj ĝi trovis rimarkindan konfirmon per eksperimentoj; ekzemple tiu ĉi esploristo fakte sukcesis forfendi hidrogenajn atomojn el azota gaso, fluoro, aluminio, natrio ktp. Koncerne aluminon oni konstatis, ke la partetoj el hidrogeno enhavas energion 1,5 foje pli grandan ol la origine uzitaj „alfa“-partetoj tiel, ke sendube la atomkerno eligis el si la troan energikvanton. —

Ne trograndigante oni povas kalkuli la esplorojn de Rutherford al la plej gravaj, kiujn iam oni faris; ili esperigas, ke en tiu ĉi rilato nin atendas ankoraŭ gravaj surprizoj.

Ĉi tie ni havas denove la fakton tre maloftan, ke scienca malkovro malproksimen trans la murojn de laboratorio kaj de faka literaturo vekas grandegan interreson publikan, kiel ekzemple okaze de l' trovo de la X-radioj per Roentgen aŭ de l' radiumo per Curie.

Kiuza.

La Kanto.

De Stevan Živanovič.

ESTAS malvarmega vespero heligata per lunradioj. Tremetas malhelaj ombroj tute silente.

El subtegmentejo de trietaĝa domo eliras tra la vitroj radioj de palpebrumanta lumo kaj tremetas.

En la ĉambroj, preskaŭ senmebla, sidas viro kun longaj sed jam blankaj haroj, kaŝinta sian korpon en mantelon. Juna li estas, sed sur lia vizaĝo estas videbla la velka freŝeco, de rozo jam mortanta pro forpreno el la florejo, kaj iomete odoranta je freŝeco, sed nur tre malmulte. Lia dudekkvina jaro! La kvina jaro, de kiam li loĝas tie ĉi en subtegmentejo, li, liberulo! Antaŭe kiel studento, poste kiel homo perlaboranta sian panon per skribado. El libroj li suĉis la scion kaj nun per sia dekstra jam tremetanta mano li tenas konvulsie la plumon kaj skribas por amuzi aliajn. La eluzita plumo moviĝas, sur la papero kreskas nigraj literoj fariĝante vortoj, frazoj, ordigitaj en vicoj unu post aliaj kiel la soldatoj

La liberulo skribas unu folion, du. Nun li ĉesas kaj viŝinte sian plumon zorgeme ĝin metas en ŝrankon kiel patrino sian infanon en la liton. Li fermis la inkujon kaj ekspiris mallaŭte, kvazaŭ per dolora voĉo simila al singulto:

„La plumo malnoviĝis; alian kanton mi tamen ne povus skribi pro malsato. Mi devas dormi, kuŝiĝi sur la stomakon, por ke ĝi ne kantu sian kutiman dolorkanton!“

La lumo estingiĝis, la sonĝo plilarĝigis sian vualon.

* * *

La stomako koleras. La liberulo movas sian korpon de unu flanko al la alia.

La lunlumo ekstremetas.

Sur ĝiaj radioj suben venas knabino.

Ŝi estas vestita per blanka vestaĵo kaj en la maldekstra mano tenas libron skribitan per oraj literoj. Sur ŝia kapo en tremetanta lumo brilas juveloj: ruĝaj, oranĝaj, verdebluaj, verdaj. Ili estas ordigitaj kaj formas la vorton:

K a n t o.

Tio estas la kanto de la liberulo!
La voĉo de tiu neatendita gastino estas kiel la sono de arĝento!

Ŝiaj okuloj brilas, ŝiaj pupiloj pli largiĝas kaj ŝi kantas:

Liberulo, vi ne dormu, nun alvenis mi!

La sono fariĝis pli forta kaj la kanto estis daŭrigata:

Sklavigu la korojn ĉarmegajn

Per vortoj el la animo

Kaj trinku la glasojn plenegajn

Per ĉarmoj de la virino . . .

Pasia ekkrio el la sonĝo eĥis tra la ĉambro. La liberulo somnambuliĝis kaj leviĝis kun duonfermitaj okuloj:

„Kiu vi estas knabino?“

„Cia infano, cia hodiaŭ kreita kanto. Patro, mi venis cin viziti!“

„Jen! Mi ne pensis ke ci estas tiel bela. Mi ne kreis cin tiel ĉarmega!“

„Jes, patro, mi estas cia flino, cia kanto, ci mem ne scias kiel belega ci min faris. Sed mi min montrás al ci tia kia min sentos la homoj en siaj animoj. Min legonte ili sentos en sia korpo agrablan dolĉecon, en ili vekiĝos pasioj, ili fariĝos delikataj, gajaj. Mi estos legata du, tri fojojn, la homoj dolĉiĝos per mi, kaj poste min demetos en la paperujon . . .“

„Bonege, sed en mia stomako ĉio revoluciĝis, mi deziras panon, ĉu mi ĝin ricevos por ci?“

„Kiel, por mi?“

„Por ci, kompreneble!“

„Ho, patro, kiel ci estas ridinda, ĉu ci scias kion la homoj pagas? La laboron, tian laboron kiu al ili donas materialan profiton. Mi estas kanto. Oni komprenas, ke presote en iu ajn revuo je miloj da ekzempleroj mi ankaŭ estos legata inter aliaj fratinoj, la homoj dolĉiĝos sian animon por momento, kaj la korpo stimulita per la animo tremos pro plezuro. La penso naskos malsanan pasion, pro kiu eble poste ploros junulino per la belegaj vortoj trompita. Sed por mi ion ricevi? Ne, ci ja kreis min por ke mi estu dolĉigo al aliaj.

„Ne pri tio mi pensis! Mia penso estis vin vendi, por aĉeti panon!“

„Ha, ha, ha! Ridinda patro: Ĉu estas tiel kiel ci pensas? Ne, ci ne konas la vivon aŭ pli bone ci ne volas ĝin ekkoni kvankam ci havas malbonajn spertojn. Ci donacos min al iu por bagatelo, kaj tiu alia, kiu min multobligos, havos profiton. Por la bagatelo ricevita vi aĉetos eĉ ne panon. Mi nur venis, por alporti al ci la gloron kaj al aliaj dolĉigon kaj monon. Tiuj aliaj post la morto cin rememoros per mallonga artikolo pri cia arto!“

La Kanto eksilentis.

„Antaŭen, antaŭen, ĉion mi volas scii!“

„Bone, mi volas rakonti, sed estu trankvila, ne koleru se mi scias cian tutan historion. Rakontis ĝin al mi mia patrino, jes, cian estontecon.“

„Kia patrino, mi ŝin ne konas!“

„Ci ankaŭ ne konos ŝin, patro, tamen ŝi ekzistas, ŝi estas bela muzo!“

„Bone, bone, mi pensis pri ŝi, sed rakontu mian estontecon!“

„Ne, ne, patro, dolora ĝi estas, mi rakontos alian rakonton aŭditan de la patrino.“

— — — — —
Li naskiĝis kiel filo de gepatroj-vilaĝanoj. Li vizitadis popolan lernejon en vilaĝo kaj poste alvenis urbon por viziti mezan lernejon, universitaton. Sed la antaŭdestino estis alia, li forĵetis la librojn pro la amo. En ĝi li vivis kelkajn tagojn feliĉege sed la finanĉino mortis . . .

„Antaŭen, antaŭen!“

Ploris pro ŝi la neperfekta studento. Li ploris tage kaj nokte, ĉar li havis senteman koron. En lia ploro kaj sufero iunokte lin vizitis feino pli bela ol mi, kaj ŝi konsentis esti la edzino de lia cerbo.

Li komencis kanti himnojn pri eterna amo kaj elegiojn pri mortinta sia amo, pri la mortinta reĝino de sia koro.

Skribis la revuoj: Li estas poeto!

Profetis la kritikistoj: Naskiĝis nova talentulo!

Sopiris la knabinoj: Se li estus nia!

Ekdeziris la patrinoj: Se li estus nia bofilo!

„Antaŭen!“

Skribis la revuoj, por ke li estu ilia kunlaboranto.

Profetis la kritikistoj, por ke ili ion skribu.

Sopiris la knabinoj, ĉar en la kanto li estas fidela kaj ili serĉas la fidelecon.

Ekdeziris la patrinoj lin kiel bofilon, ĉar li estis populara.

Kaj, la poeto stimulte per la belaj vortoj kantis kaj kantis, sed la stomako estis pli ofte malplena ol plena. Per la kantoj li nutris animojn de aliaj . . .

„Antaŭen!“

Fine la mizero forportis la lastan peceton da pano el lia domo!

„Antaŭen!“

Li iris de unu redakcejo al alia kaj serĉis helpon, sed vane, kantoj estas kantoj, la profito por la aliaj, la gloro por la poeto. Dio fariĝis diablo!

„Kiel? mi ne komprenas!“

Jes, ĉar per la unu nomo oni nomas la saman imagatan personecon en la bono kaj per la alia en la malbono. Nun ci scias.

„Ĉu la helpo venis?“

La helpo ne venis, la sorto trompis la vivosongon, la rikoltilo de l' morto forprenis ankaŭ lin.

„Dolore!“

La revuoj publikigis lian portreton, kaj artikolon pri li!

La kritikistoj skribis: Mortis talentulo, kiu havis ankoraŭ multe por diri.

Ekploris la knabinoj.

Faris la saman la patrinoj.

„Dolore, dolore,“ diris la liberulo kaj ekploris.

Kial ci ploras patro, ci, kiu en la dudek-kvina jaro blankhariĝis, kiu havis amason da zorgoj, kiu sufiĉe ĝis nun ploris?

„Ĉar tiu historio estas la mia!“


— — — — —
„Ĉu tiel rapide mi devas morti?“ ekkriis la liberulo. A, mi songis, mi songis!

La lumo en la ĉambro reaperis, la liberulo skribis la historion aŭditan en la duonsongon.

* * *

Matene oni trovis lin mortinta pro frosto, kuŝanta ĉe la tablo, kaj la lampo estis ankoraŭ brulanta.

Sur la planko oni vidis kelkajn gutetojn, kvazaŭ la muzo lasis larmojn!



Nürnberg, ĉe la Haller-pordego.

LEGENDOJ de NÜRNBERG.

La Wöhrd'a Barthelo. Esp. *D-ro Kleider*. La lacerto.

La patrono de la Wöhrd'a preĝejo (konstruita de post 1557) estas „Sankta Bartholomäus“, de la loĝantoj mallonge nomata Barthelo; de antikve li estis multe ŝatata de ili kaj multaj piaj fondaĵoj estis donacataj al li. Ludoviko Schöda, de 1509 ĝis 1515 juĝisto en Wöhrd, la sanktulon eĉ fandigis el arĝento kaj la artefaritaĵon donacis por la tiama kapelo en Wöhrd. Preskaŭ unu ulno*) alta estas la figuro kaj naŭ markoj**) da lutebla arĝento estis uzataj por ĝi. Sed tuta Wöhrd ankaŭ estis fiera pri tiu ĉi sia Barthelo.

Sed okazis, ke en la jaro 1540 la tiama preĝeja servisto, Frederiko Embler, subite malaperis el Wöhrd kaj kun li ankaŭ la trezoro de la preĝejo: ĉirkaŭe 500 florenoj da kontantaĵo, krom tio ĉiuj arĝentaj juveloj, precipe la arĝenta Barthelo. Nature la suspekto „la cititajn monojn kaj objektojn malice esti kunpreninta“ tuj sin direktis kontraŭ la fuginta servisto. En la forlasita servista domo nenio estis trovata, kaj ankaŭ la restadejo de la ŝtelinto ne povis esti eksciata. Sed ĉar ja estis neverŝajne, ke la pezan Barthelon li kun si transportis, senditon oni sendis al Schnaittach, kie tiam restadis multaj komercistoj kaj brokantistoj, por sciigi, ĉu ne „io“ ĉe tiuj estis vendata aŭ deponata. Tiuj ĉi esploroj ankaŭ havis la esperitan sukceson: Ĝoje la Wöhrd'anoj reaĉetis sian sanktulon kaj retransportis al ĝia antaŭa loko. En sia rememortago de post tiam sur malgranda altaro por la rigardado ĝi estas ekspozata, sed ekster tiu tempo konservata en kesto sekura kontraŭ ŝtelistoj en la sakristio.

De post tiu ĉi tempo ekaperis la malica kalumnio, ke la Wöhrd'anoj mem sian sanktulon laŭdire deponis dum la tuta jaro kaj nur reaĉetis en la preĝeja inaŭgura rememortago, pro kio ĉie ajn ili estis nomataj „Bartheldeponintoj“.

*) Unu ulno = 0,833 m.

**) 9 markoj da arĝento (à 288 g.) = 2,592 kg.

Ĉiujare dimanĉe post Johanni (24. junio) estas festata la rememoro pri la preĝeja inaŭguro; en tiu ĉi tago preskaŭ ĉiuj tomboj sur la tombejo tre bele estas ornamataj per girlandoj kaj floroj ĉiuspecaj. Maljunularo kaj junularo tien elmigras, por viziti la tombojn, aŭ por denove foje viziti la ripozejon de famaj Nürnberganoj kaj momenton dankplene rememori pri ili. Jen do ankaŭ la infanoj ne forgesos lasi sin gvidi al tiu tombomonumento (n-o 2150) proksime de la Holzschuherkapelo — kontraŭe de la pastra domo — sur kiu artplena metala figuraĵo (epitafo) prezentas dormantan infanon kun movebla lacerto.

La posedanto de tiu ĉi tombo havis viglan filineton, kiu estis la karulino de la tuta domo. Plej bone la infano fartis, povante ludi kaj petoli en la belega ĝardeno, ĉirkaŭanta la gepatran domon. En iu mirinda printempa mateno laŭ sia maniero dum horoj ĝi estis ĉirkaŭvaginta kaj laciĝinte pro ekscitanta papilia ĉasado, ĝi estis ekdorminta sur la herbaro. Kun duone malfermita buŝo, kiamaniere infanoj kutimas dormi, jen ĝi kuŝis.

Subite la ĝardenisto aŭdis teruran infanan kriegadon; la knabinon li trovis treege ekscitita, tordiĝanta je plej akraj doloroj. Kiam oni demandis, kio okazis, ŝi tute ne povis respondi sed nur montris al sia ventro kiel al loko de siaj doloroj. La gepatroj rapide estis alvenigataj, same kuracisto; sed neniu povis konstati, je kio suferas la etulino, helpis neniu medikamento. La knabino fine falis en konvulsiojn, kaj post malmultaj horoj ŝi mortis.

La enigma malsaniĝokaj la rapide okazinta morto instigis la gepatrojn, sekciigi la karan mortintinon per kuracisto por sciigi la mortkaŭzon. Jen nature tio malkaŝiĝis! Lacerto, aliookaze tiom senkulpa, tra la malfermita buŝo de la dormanta filineto estis rampinta en la stomakon kaj tiamaniere kaŭzinta la morton de la kompatinda infano.